FN PER ANC 47

n° 187 Marto 1996

ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO
unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## NORMANDAJ ESPERANTISTOJ BALDAŬ

## KUNVENOS

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

Kiel ni jam anoncis al vi en lasta bulteno, okazos kunveno de nia Unuiĝo **dimanĉon 24an de Marto 1996 je la 14a horo.**

Nia antaŭa kunveno okazis la 10an de Aprilo 1994. De tiam, la situacio en nia provinco ne evoluis favore al niaj ideoj.

Estraro kunvenis tre malofte kaj nenion faris...krom regula apero de nia bulteno.

"Maljunuloj" kiuj gvidas nian asocion de pluraj jardekoj emas al ripozo kaj atendas senpacience deĵorŝanĝon kiu devus alporti dinamikon, entuziasmon, agemon... kaj sukceson.Ni rediras ke tia ŝanĝo estas nepre necesa ĉar ni konstatis, leginte bultenojn de aliaj regionoj, ke ni estas en la lasta vagono de Esperanto-trajno! Kio do okazas en nia provinco? Ĉu kulpas la klimato?

Pro tio, ni insiste petas agemulojn sin proponi kiel kandidato por nova estraro.
Malnovaj estraranoj estas petataj ankaŭ rekandidatiĝi por helpi novelektitojn.
Informu nunan prezidanton, Pierre POTTIER, pri via kandidateco al nova estraro.

Venu multnombraj ĉeesti nian kunvenon por konatiĝi, por informiĝi,por konigi viajn opiniojn.

Petro KIJO

# ASSEMBLEE GENERALE
# de
# ESPERANTO-NORMANDIE

## Assemblée Genérale de l'Union des Espérantistes de Normandie:

Cette Assemblée Générale statutaire se tiendra :

Dimanche 24 Mars 1996 à 14 heures

Halle aux Toiles, Place de la Basse Vieille Tour, Rouen (Rive Droite)

Salle N°2, deuxième étage

Tous les espérantistes de Normandie doivent y participer. Nous comptons sur votre présence. Réservez cette date dès maintenant sur votre agenda.

On nous a fait la remarque qu'il ne fallait pas rebuter les nouveaux et les sympathisants en n'utilisant que l'Espéranto: une grande partie des débats aura donc lieu en français!

ORDRE DU JOUR:

- -Rapport Moral
- -Rapport Financier
- -Bulletin Normand
- -Actions à engager
- -Renouvellement entier du comité directeur (estraro)
- -Résolutions et questions diverses

Tous les participants pourront prendre part aux discussions mais ne pourront voter que les adhérents ayant réglé leur cotisation 1994 ou 1995.

## FEDERATION NORMANDE DE FRANCE ESPERANTO (U.F.E.)

Cette réunion des adhérents d'UFE traitera des relations entre la Fédération Normande et l'association nationale Union Française pour l'Espéranto.Cette réunion nous fournira des informations sur le mouvement espérantiste national et international, sur les congrès d'UFE et d'UEA. Tous pourront y participer mais seulement les adhérents d'UFE pourront prendre d'éventuelles décisions.

Nour rappelons que lors de notre Assemblée Générale de 1994, nous avions décidé que les deux structures auraient le même Conseil d'Administration.

*************************************************************************

CONSEILS PRATIQUES pour venir à Rouen le dimanche 24 Mars:

**PARKING:** Il est facile de garer sa voiture gratuitement le dimanche sur les quais de la rive droite ou la garer dans la parking payant de la place de la Haute Vieille Tour.

**REPAS :** Comme il y a 2 ans, nous pourrons manger ensemble au Restaurant Libre-Service FLUNCH, 60 rue des Carmes

Rendez-vous entre 12h et 12h 15 devant la porte du restaurant

Ceux qui désirent faire une visite de Rouen le dimanche matin devront contacter Petro Quillaud.

*************************************************

# SITUATION FINANCIERE

1994

| RECETTES | | DEPENSES | |
|---|---|---|---|
| **au CCP le 31/12/93** | **11001,66** | | |
| Cotisations reçues en 1994: | 2760,00 | Bultenoj 178 à 181 | 2919,91 |
| Avoir du GERR (Association dissoute) | 1554,30 | Cotisation au GAE | 200,00 |
| | | Propagande | 187,72 |
| | | Secrétariat-PTT | 197,90 |
| | | | 3505,53 |
| | | **Au CCP le 31/12/94** | **11810,43** |
| | 15315,96 | | 15315,96 |

1995

| RECETTES | | DEPENSES | |
|---|---|---|---|
| **au CCP le 31/12/94** | **11810,43** | | |
| Cotisations reçues en 1995: | 2525,00 | Bultenoj 182 à 185 | 2717,00 |
| | | Cotisation au GAE | 200,00 |
| | | Propagande | 60,00 |
| | | PTT | 5,50 |
| | | | 2982,50 |
| | | **Au CCP le 03/11/95** | **11352,93** |
| | 14335,43 | | 14335,43 |

Noto:Ni registris por 1991: 61 kotizojn
1992: 34 kotizojn
1993: 47 kotizojn
1994: 77 kotizojn
1995: 61 kotizojn

La kontoj estas kontrolitaj de Pierre JOUVIN.

La Kasisto: Pierre Quillaud

Kontoj de Fédération Normande d'UFE:

Mi nun estas ankaŭ kasisto de Fédération Normande.
Okazis neniu mon-movo inter la 31/08/93 kaj fino de jaro 1995,krom taksoj por CCP.

La 31an de Decembro 1995,estis ĉe posta konto: 2973,22 FRF

## KANDIDATILO POR ESTRARO DE "ESPERANTO NORMANDIE"

Mi estas kandidato por fariĝi membre de estraro de Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj.

Nomo k antaùnomo:
Adreso:
Telefono:

Subskribo

Bonvolu sendi tiun folion (aù kopion) al Prezidento de U.N.E.:
Sro Pierre POTTIER
21 allée des roitelets
76190 YVETOT
*******************************************************************************

## ABONU REVUOJN

Bonvolu korekti informon aperinta en antaùa bulteno:
La Migranto (Naturamika Bulteno) :
Pagu 55 FRF al CCP Esperanto-Migranto 2076 05 N Paris
Sendu vian ĉekon al Aurore Casanova
25,rue de Bourgogne
94440 Villicresnes

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

## NEKROLOGO

Ni malĝojas informi vin pri forpaso de du geamikoj kiujn ni havis okazon renkonti plurfoje okaze de regionaj kunvenoj:

Sinjoro Camille MARTIN mortis 82-jara dum lasta decembro. Li estis estro de la grupo el LISIEUX. Kiam lia sanstato ebligis tion, li regule partoprenis niajn normandajn renkontiĝojn, ĉiam alportante sian bonhumoron.Li propagandis kaj instruis nian lingvon ĝis lasta momento.
Sinjorino ANGENAULT el VER sur MER ankaù forlasis nin. Ŝi tre helpis sian edzon organizinte semajnfinon en Asnelles kaj aliajn aktivaĵojn en fervojista medio.
Ni kondolencas iliajn familianojn.

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

## VIVO DE NORMANDAJ GRUPOJ :

**Hérouville Saint Clair (14) :**
- Iniciato al Esperanto: ĉiusemajne, nia amikino Odile Masseron iniciatas Esperanton en Frenet-lernejo al 5 infanoj (CM1) per ludoj, bildoj, paroladetoj.
- Kursoj: daùras la ĉiusemajnaj kursoj
- Ĝenerala Asembleo: ĝi okazis en nia klubejo la 9an de Januaro, sekvata de la tradicia Reĝofesto (35 partoprenantoj)
- Antaùvidita: Prezento de la Sorobano (Boulier Japonais) far japana samideanino, Kimie Markarian. Ĝi okazos antaù esperantista kaj ne-esperantista publiko.
- Muzika vespero kun la grupo KAJTO

***PRATIQUEZ L'ESPERANTO AU CALME ,A LA CAMPAGNE !***

*PRATIQUEZ L'ESPERANTO AU CALME ,A LA CAMPAGNE !*

**à BOURESSE**, dans la VIENNE.

Bouresse est un petit village de 700 habitants, à 35 km de Poitiers. Le Centre comprend 5 petites maisons réparties autour d'une cour centrale et aménagées pour accueillir une quinzaine de personnes, dans un calme campagnard. Les personnes venant par le train peuvent être accueillies en gare de Poitiers.

La nourriture, simple et naturelle, est excellente. Les prix sont modérés: 100 FR d'adhésion, 200 F pour un hébergement modeste, quelle que soit la durée du séjour, et 101 F par jour pour les 3 repas.

Des excursions sont possibles, si le nombre de voitures est suffisant, à Poitiers et dans les environs immédiats.

PROGRAMO 1996:

15a Aprilo-19a Aprilo: Muziko, kanzonoj kaj skeĉoj
Gvidas: Nikolin kaj Sylvie Bonnet

22a Aprilo-26a Aprilo: Traduk-staĝo.Preparado al skriba parto de la 3a grada ekzameno Gvidas: Georges Lagrange.

16a Aprilo-21a Majo: Pied-migrado: petu specialan programon
Gvidas Ginette Gabillon kaj Monique Dussenty

23a Majo-27a Majo: Ekkono de Esperanto kaj trejniĝo al praktikado de la lingvo per la Rik-metodo de M.A.Rohrbach.
Ce stage intéresse tous les amis "rikantoj" qui souhaitent s'initier à la valeur culturelle de la Rika Metodo, procédé JEAN
Vous vous inscrivez le plus tôt possible auprès de:
Suzanne Bourot "La Kvinpetalo"
route de Civaux 86410 Bouresse Tel. 49 42 80 74
Faites connaitre votre inscription au centre RIK en avertissant:
Jeanne-Marguerite Delavallade
29, Cours A. Briand, 69300 Caluire et Cuire T.78 23 17 41

La Kvinpetalo assure l'hébergement et la nourriture, le Centre RIK prend en charge le programme des 5 journées d'initiation et d'entrainement à l'Esperanto par la Rika metodo (emploi du temps, séances de travail, promenade, excursion )

*************************************************************************

**à LA CHAUX DE FONDS** en SUISSE

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA: La Chaux de Fonds, Postiers 27,
CP 779, CH 2301
Tel.41 39 267 407

La KCE aranĝas diversajn kulturajn monatfinojn kaj kursojn.
Aliĝo al Kultura Monatfino (programo+vespermango): 60 CHF
Aliĝo al Somera Kurso (nur la instruado): 120 CHF
Eblas tranokti ce la Domparo (po 15, 30, 40 CHF, laŭ la nombro da litoj en la ĉambro). Ankaŭ en Junulgastejo kaj moderprezaj koteloj.

Petu programon kaj aliĝilon, skribante al KCE.

au **CHATEAU GRESILLON à BAUGE** (Maine et Loire)

Meze de naturo, en bela regiono, Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj posedas la kastelon Grésillon kun 18-hektara parko

Baugé situas ce vojkrucigo de 2 gravaj vojoj: Angers-Tours kaj Le Mans-Saumur
Buso de la Nacia Fervoja Kompanio (SNCF) haltas en Baugé .

*La vivo en la Esperanto-Domo:*

-Kursoj kaj prelegoj: 9.30-12.00 kaj 16.30-19.00
-Artlaborado,ripozo: 14.00-16.30
-Distra Vespero: 21;00
-Manĝoj: 8.30-12.30-19.30

La Libro-servo funkcias ĉiu-tage. La "butiko" akceptas la kaf- kaj te-ŝatantoj ekster la kultur-aranĝoj.
Ekskursoj okazos laŭ la elektoj de la ĉeestantoj.

*Prezoj por 1996:*
Jara kotizo al la asocio:50.00FRF
Kulturaj kostoj: po 130.00 FRF staĝe

Prezoj potage por unu persono (tranoktado kaj tri manĝoj, sen trinkaĵoj) :

| | pli ol 6 tagoj | gis 6 tagoj |
|---|---|---|
| unupersona ĉambro | 200 | 240 |
| ĉambro por familio (2/5 personoj) | 165 | 215 |
| kolektiva dormejo (5/8 personoj) | 140 | 175 |
| tendumantoj kun manĝoj | 130 | 140 |
| tendumantoj sen manĝoj | 20 | 20 |
| infanoj ĝis la 6a jaro | 70 | 90 |

Tag-aŭ-vespermanĝo por vizitantoj : 55 FRF

*Kulturaj Arangoj 1996:*
La internacia renkonto de infanoj okazos de Sabato 13a gis Sabato 20a de Aprilo.
Internacia Amika Renkonto okazos de ĵaŭde 20a de Junio posttagmeze gis sabate 6a de Julio matene. Nedeviga programo: kursoj por praktikantoj kaj lertuloj, gvidataj konversacioj, komunaj promenadoj, distraj vesperoj.

*Someraj Aranĝoj:*
- De dimanĉo 7a gis dimanĉo 14a de Julio: Kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj. S-ino J. Vincent gvidos preparadon al la Kapableco kaj kurson "lerni la francan lingvon per Esperanto".
- De dimanĉo 14a gis dimanĉo 21a de Julio: Kursoj por komencantoj (dua parto), praktikantoj kaj lertuloj.
- De dimanĉo 21a gis dimanĉo 28a de Julio: Kurso por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj. "Gramatiko": André Cherpillod gvidos.
- De dimanĉo 28a de Julio gis dimanĉo 4a de Aŭgusto: Kurso por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj. "Traduko" (el la franca lingvo): G.Lagrange gvidos.
- De dimanĉo 4a gis dimanĉo 11a de Aŭgusto: Kurso por komencantoj (unua parto), por praktikantoj kaj por lertuloj
- De dimanĉo 11a gis dimanĉo 18a de Aŭgusto: kursoj por komencantoj (dua parto), por praktikantoj kaj por lertuloj.
- De dimanĉo 18a gis dimanco 25a de Aŭgusto: kursoj por praktikantoj kaj por lertuloj

Fine de ĉiu periodo, estas ebleco organizi ekzamensesion.

Libro-bindado, korbofarado kaj aliaj metiaj laboroj estas antaùviditaj.

*Vous êtes espérantiste,votre conjoint (e) ne l'est pas !: En venant à Grésillon, vous participerez aux cours pour"praktikantoj"ou"lertuloj;" et pendant ce temps, pris par l'ambiance génerale votre conjoint (e) se décidera à suivre les cours pour "komencantoj"!*




Demandez le programme et le bulletin d'adhésion à:

Esperanto-Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
85180 Le Château d'Olonne

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**ĜENERALA KUNVENO de la**
**ESPERANTISTA FEDERACIO DE LABORO (FET)**
ĝi okazos en Saint Denis ĉe la Laborborso
Dimanĉon la 24an de Marto
*Bedaùrinde por kelkaj,la asembleo de Normandaj Esperantistoj okazos la saman tagon.*

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**La 51a Kongreso de SAT-AMIKARO**
okazos en Orly de la 6a gis la 9a de Aprilo (dum Pasko 1996)
Krom la kutimaj kongresdebatoj,vi havos okazon viziti:
- Akvopurigan uzinon
- Flughavenon de Orly
- Entreprenon de plasturgio
- Reguligan centron de rapidega trajno TGV
- Mezepokan Kastelon de Blandy-lès-Tours kaj Vaux-le Vicomte (17a jarcento)

Vi trovos aliĝilon ene de tiu bulteno.

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**La 88a UFE Kongreso (FRANCE-ESPERANTO)**
okazos en Villeurbanne de la 16a gis la 19a de Majo (Ĉieliro 1996)
Krom oficialaj kunsidoj, la programo entenas jenajn allogajn okazaĵojn:
- Krozado sur rivero Saône
- Vizito de Fourvière kaj Vieux-Lyon
- Junular-Renkonta Balo
- Ekskurso aùtobusa al Beaujolais kun gastronomia tagmanĝo

Vi trovos aliĝilon ene de tiu bulteno.

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**81a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**
Okazos en Prago de la 20a gis la 27a de Julio
Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe UFE 4bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**69a Kongreso de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA**
okazos en Sankt-Peterburgo de la 13a gis la 20a de Julio
Antaù-Kongreso okazos en la sama urbo de la 6a gis la 13a de Julio.
Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe SAT , 67 Avenue Gambetta 75020 Paris

PRAKTIKUKONGRESUPRAKTIKUKONGRESUPRAKTIKUKONGRESUPR

**48a KONGRESO DE IFEF ( Fervojistoj)**
ĝi okazos en La Haye, Nederlando
de Sabato la 11an ĝis Vendredo la 17an de Majo

*************************************************************************

*Eltirajo el Rok'Gazet'* :

## ESPERANTO-TRIOPO

En Marto 1993, duopo kreiĝis en ROUEN sub nomo :*"Esperanto"*kun Eric Saunier (akordiono, kanto) kaj Manu Dubois (gitaro,kanto). Unu jaron poste,*"Esperanto"* triopiĝis kaj riĉiĝis per aldono de basgitaro kaj perkutilaro kun la alveno de Olivier Collet.

Neniu el la tri estas esperantisto, kaj ĝis nun ili neniam kantis nek aŭdis esperanton. Strange,sed estas tiel!

Ili elektis *"Esperanto"*-n kiel nomo ĉar ĝi kongruas kun la muziko de la triopo. Jen kiel ili prezentas sin:

*"Esperanto, universala lingvokoncepto, estas la simbolo de la lingvo de la kulturoj cele al komunikado kaj harmonio. Muziko estas unu el la lingvoj kiuj malfremdigas la homojn, ĉar ĉiuj komprenas ĝin."*

Tiel ili ludas, inspirate de ĉitieaj kaj de aliejaj muzikoj, tiuj kiuj vojaĝis kun la homoj kaj transpaŝadis la landlimojn. Ilia populara repertuaro estas tre eklektika kun ciganeca, hispaneca, aŭ kelteca akcentado.

*"Esperanto"* ofte koncertas; de kiam la bando ekestis, ili faris pli ol cent kvindek koncertojn. Inter ĉiuj tiuj koncertoj kelkaj okazis ekster Francio: en Britio, Nederlando, Germanio kaj Danio.

La muzika spirito de *"Esperanto"* per sia folka repertuaro entuziasmigis multnombrajn publikojn. La triopo travojaĝigas sian spektantaron komplice tra tuta Eŭropo, de okcidento gis oriento kaj de nordo ĝis sudo.

Ni nun povas nur esperi ke baldaŭ *"Esperanto"* kantos esperante.
Instigu ilin tion fari; certe ili estos atentaj al viaj petoj kaj proponoj. Kontaktu ilin Manu Dubois et Olivier Collet 4, rue des Carmélites , 76000 Rouen

FLO

***Mi jam povas informi vin ke la triopo baldaŭ registros kompaktdiskon. Unu el la kanzonoj estos esperantlingva. Mi renkontis tiujn simpatiajn junulojn. En mia hejmo, ili aŭskultis esperantajn kantojn. Mi donis al ili konsilojn por la prononcado.***

Petro KIJO

VOUS AVEZ UN MINITEL ?
Tapez 3615 ESPERANTO :vous aurez tous les renseignements sur l'Esperanto et les activités espérantistes

VOUS aimez les vins d'ALSACE ?
Commandez des vins sélectionnés et étiquetés en Esperanto
Demandez tarifs et Bons de Commande à Philippe GOCKER, 24 rue de Riquewihr; 68630 Mittelwihr Tel.89 49 01 23

| | | |
|---|---|---|
| | - *Vespermanĝo* - Libera | en malgrandaj restoracioj de Vieux-Lyon (rezervigoj eblaj), aù kie vi volas |
| | - 21h - **Junularrenkonta Balo** kun rokmuziko - *Bufedo - Trinkaĵoj* | En Kongresejo ( Bala salono) - Senpaga eniro por UFE gekongresanoj (surhavante la kongresinsignon). |
| Dimanĉon 19/05/95 | 8h30 - Rendevuo ĉe Hotelo Campanile enirejo<br>8h45 - **Ekskurso al Beaujolais** kun *gastronomia tagmanĝo* vingustumado kaj vizito de "Hameau du Vin" (Duboeuf en Romanèche-Thorins) | Foriro aùtobuse el Hotelo Campanile<br>Reveno al stacidomo Part-Dieu kaj Campanile je 17h *(pli frue se eblas)* |

**Loĝ-Prezoj :**
Hotelo **Campanile :** ĉambro ( 1,2 aù 3 personoj) : 200 FRF ttc ponokte, poĉambre 31, Rue Maurice Flandin, 69003 Lyon, Tel : 72 36 31 00
Bufeda Matenmanĝo (po 34 FRF persone ) - Aùtoparkejo : 30 FRF potage

**Loĝado por aliĝontoj al FESTO (JEFO-Renkonto) :**
Petu specialan mendilon de FESTO - Bruno FLOCHON, 6 c, Bd de l'Hippodrome, 69890 La Tour-de-Salvagny Tel : 78 48 00 40

**Transporto de Hotelo Campanile al Kongresejo :**
**Per Metroo** - Stacio apud stacidomo Part-Dieu (300m de hotelo - transiri la SNCF stacidomon) Linio B direkto "Charpennes". Ŝanĝi al linio A ĉe stacio "Charpennes", direkto "Bonnevay"- Eliri el stacio Flachet (Cours Emile Zola). *Mapetoj disdonotaj.*
- Bileto Bus/Metroo : 7 FRF - 10 biletoj : 65 FRF - Tagabono : 23 FRF

**Parkejoj** - Hotelo Campanile : Enirejo Rue Maurice-Flandin antaù hotelo-enirejo
- Apud Kongresejo (Centre Culturel de Villeurbanne) Rue Flachet, malantaù "Maison des Sports" (senpaga). *Mapeto disdonota.*

## ALIĜILO UFE NACIA KONGRESO 1996 - LYON-VILLEURBANNE

Konstanta adreso : C.E.R.L. 7, Rue Major-Martin, 69001 LYON - Tél : 78 83 67 08 - Fakso : 78 83 67 08 (Marc LEVIN)

S-ro/ino : .................................................... Baptonomo : ....................................................
Adreso : .................................................... Poŝtkodo : .................................... Urbo : ..................................
Kongresnumero (se jam sendita al vi) : ....................................................

| **KONGRESKOTIZOJ** | ĝis 31/12/95 1a periodo | ĝis 31/03/96 2a periodo | poste 3a periodo | unutage |
|---|---|---|---|---|
| **KATEGORIOJ** | | | | |
| 1. Unuopulo | 300 FRF | 350 FRF | 400 FRF | 120 FRF |
| 2. Paro | 500 | 575 | 650 | 200 |
| 3. Senlaborulo (kun atestilo) | 150 | 150 | 150 | 90 |
| 4. Studanto/ino (pli ol 18 jara) | 150 | 150 | 150 | 90 |
| 5. Aliaj junuloj (12-18 j.) | 100 | 100 | 100 | 60 |
| Infanoj (-12j.) ne pagas | | | | |
| 6 : Eksterlandanoj : | Senpage | | | |

* Mi aliĝas en jena kategorio : .............................. Naskiĝdato : ..............................

* Se mi pagas por paro, jen nomo de kunkongresan(in)o : ....................................................

* Mi pagas : ..............................frankojn, per bankĉeko N° :.............................. Banko :..............................
per ĝiro al poŝtĉekkonto ESPERANTO NACIA KONGRESO 96 CCP Lyon10 288 16 B

Mi alvenos ................../05/96, je ..............................horo, per : trajno / aùto / alia .............................. *(substreku unu)*

Subskribo :.................................................... Dato : ....................................................

***Aliĝo al "FESTO" (JEFO Renkonto) - Petu specialan aliĝilon de Bruno Flochon, 6 c, Bd de l'Hippodrome, 69890 LA TOUR-de-SALVAGNY Tel 78 48 00 40***

Supplément au n° 507 de SAT-Amikaro, décembre 1995 et janvier 1996. CPPAP n° 56121. Directeur de la publication : J. Selle

# 51a Kongreso de SAT-Amikaro en Orly, 6a ĝis 9a de aprilo 1996

**Centre Culturel ARAGON-TRIOLET, 1, place du Fer à Cheval, 94310 ORLY % 16 (1) 48 92 39 29**

| KONGRESKOTIZOJ | ĜIS 29.02.96 | POST 29.02.96 |
|---|---|---|
| Membro de SAT-Amikaro | 180 FF | 250FF |
| Familiano de membro | 90 FF | 150 FF |
| Junulo (15 ĝis 25 jaraĝa) | 85 FF | 135 FF |
| Infano (malpli ol 15 jaraĝa) | senpaga | senpaga |
| Infano partoprenanta infankongreseton | 50 FF | 100 FF |
| Gasto kaj familiano de gasto | 250 FF | 300 FF |

Subtenkotizo : Kiu donacos almenaŭ 100 FF ricevos la kongresdokumentojn.

## TRANOKTOJ

Kun matenmanĝoj en hotelo.
Busoj kunprenos la kongresantojn en la hoteloj matene kaj retransportos ilin vespere.
De sabato ĝis lundo = 2 noktoj
* Hotelo, 2 steloj, komforta ĉambro por 2 aŭ 3 personoj : 330 x 2 = 660 FF
(sama prezo se vi deziras esti sola en la ĉambro)
*Tendejo : 65 FF po nokto, 1 aŭ 2 personoj + 20FF po alia persono
* Ruldomoj : 115 FF po nokto, 1 aŭ 2 personoj + 20 FF po alia persono
* Amasloĝejo : 20 FF po nokto. Bonvolu kunporti dormosakon kaj matracon.
Rezervigo de ĉambro ne ebla por nur unu nokto, sed ebla por pli ol du noktoj.

## MANĜOJ

Ĉiuj tag/vesper-manĝoj en apuda memserva restoracio - Vi mem pagos surloke.

## TUTTAGA EKSKURSO

**Mardon 9-an de aprilo. Prezo : 100 FF.**
- Mezepoka Kastelo (Fortikaĵo) de Blandy-les-Tours
- Kaj Vaux-le-Vicomte (17-a jarcento)
Tagmanĝo : Vi mem pagos surloke (en la memserva restoracio de la kastelo de Vaux-le-Vicomte).
La buso revenos je la 17-a ĉe la RER-stacio Choisy-le-Roi.

## DUONTAGAJ EKSKURSOJ PER AŬTOBUSOJ

**Sabaton 6-an de aprilo. Prezo : 25 FF**
Indiku vian preferon per kruco.
Ekskurso n° 1 ❑ Akvopuriga uzino de "Compagnie des Eaux", en Orly/Choisy-le-Roi, per kiu akvo el Sejno fariĝas trinkebla. La plej moderna en la mondo. Unu grupo matene kaj unu posttagmeze.
Ekskurso n° 2 ❑ Flughaveno de Orly. Posttagmeze.
Ekskurso n° 3 ❑ Plastindustrio (Entrepreno de "plasturgio" PTM en Orly). Posttagmeze.
Ekskurso n° 4 ❑ Reguliga centro de rapidega trajno TGV de la stacio Paris-Montparnasse. Ptm.

## PAGOJ

Per poŝtĉeko au bankĉeko je la nomo de la kasisto :
Michel GOYER, CCP n° 38.754.94 J La Source

Vi sendu al la Sekretariino : Yvette BRETT, C3, allée du Midi, 94310 ORLY
- la "kongresaliĝilon" kaj pagon kiel eble plej baldaŭ.
- afrankitan koverton kun via adreso por ricevi konfirmon de via aliĝo.

# Kongresaliĝilo

Antaŭ ol plenigi la aliĝilon, bonvolu legi la informojn ĉe la dorso.
Precize respondu al ĉiuj demandoj kaj skribu PRESLITERE. Dankon.
Kiu aliĝas tuj pagu la tuton. Okaze de nepartopreno, la OKK repagos ĉion, escepte de la kongreskotizo kaj de la unua nokto, se ni ne povas reuzi la ĉambron por alia persono.
Povos ĝui la tarifon **SAT-Amikaro**, nur tiu kiu pagis la kotizon por 1996.

Asocia kotizo al SAT-Amikaro : 170 FF
Subtena kotizo : 340 FF.
Junulo ĝis 25 jaroj : 85 FF.

Familia nomo kaj antaŭnomo :
Nomo kaj antaŭnomo de la kunul(in)o :
Antaŭnomo kaj aĝo de la infano(j) :

Adreso kaj telefono :

Trastreku la netaŭgajn indikojn :

Ni alvenos (dato kaj horo) :
Ni deziras loĝi kun :
Ni deziras kroman nokton vendrede, lunde, marde vespere
Ni deziras trapasi ekzamenon de F.E.I. :
- duagradan
- triagradan skriban aŭ parolan parton

Ni deziras partopreni konversacian kurson :
- por progresantoj
- por komencantoj

| **Mi mendas kaj antaŭpagas por :** | **Prezo** | **Nombro** | **Sumo** |
|---|---|---|---|
| *Kongreskotizoj por membroj de SAT-Amikaro kaj por gastoj -por unu persono depende de la aliĝdato (tarifoj dorse) :* | | | |
| Membro de SAT-Amikaro | | | |
| Familiano de membro | | | |
| Junulo ĝis 25-jara | | | |
| Infankongreseto | | | |
| Gasto kaj familiano | | | |
| Subtenkotizo | | | |
| Ĉambro (por unu, du aŭ tri personoj) (atentu : nur unu paganto po ĉambro) | 330 | | |
| Tendejo (vidu la tarifon dorse) | | | |
| Ruldomo (vidu la tarifon dorse) | | | |
| Amasloĝejo | 20 | | |
| Tuttaga ekskurso | 100 | | |
| Duontaga ekskurso | 25 | | |
| Kongresmarkoj (folio de 16) | 15 | | |
| Kotizo 1996 al SAT-Amikaro (tarifoj supre) | | | |
| | **TOTALA SUMO :** | | |

☞ Konservu kopion de via aliĝilo

Dato : Subskribo :

# 88a UFE KONGRESO 96 - Ĉieliro (Ascension - 16-19an de Majo1996)

**Konstanta adreso : UFE NACIA KONGRESO 96 - 7, Rue Major-Martin, 69001 LYON - Tel/Faks 78 83 67 08** (Marc LEVIN)

*Jen la provizoran programon, iom modifigita kaj riĉigita, kun aliĝilo kaj mendiloj. Do, bonvolu tuj resendi ilin al nia konstanta adreso( ĉi-supre ). Ni vigle klopodas por prezenti al vi agrablan kaj utilan programon kaj ni esperas akcepti vin multnombrajn, en Villeurbanne kaj Lyon.*
*Junularrenkonto, nomita FESTO ( For l'Enuo Sen Tema, Optimismo) estas organizata de JEFO preter la UFE Kongreso. Por informoj kaj aliĝoj, kontakti FESTOn, Bruno FLOCHON, 6 c, Bd de l'Hippodrome, 69890 La Tour-de-Salvagny, Tel : 78 48 00 40.*

*LKK*

**Provizora Programo :**
Kongresejo : Centre Culturel et de la Vie Associative de Villeurbanne, 234, Cours Emile-Zola, 69100 Villeurbanne (métro Flachet) Tel : 78 68 19 86
Loĝado en Hôtel-Gril CAMPANILE, 31, Rue Maurice-Flandin, 69003, Lyon ( Fronte al Stacidomo Part Dieu - Elirejo "Villette" - 200 m)

| | | |
|---|---|---|
| Jaùdon 16/05/96 | - **Akcepto** ekde la 12a en Campanile<br>- Por fruaj alvenantoj, eblos krozadi sur rivero Saône<br>- Eblos ankaù butikumadi en Komerca Centro Part-Dieu | - 200m de Stacidomo Part-Dieu (elirejo "Villette'<br>- Enŝipiĝo : 13h40 - 14h40 - 16h40 - Prezo : 42 FRF<br>Quai des Célestins, maldekstra bordo, fronte al Juĝejo |
| | Matene - **Ĝenerala Kunveno de JunularRenkonto "FESTO"** | - En Kongresejo (Granda Amfiteatro) |
| | Posttagmeze - **Kunsido de la Komitato** (Nuna konsisto)<br>- **Fakaj Kunvenoj** - Kunagado - Unesko | En Campanile<br>En Kongresejo (malgrandaj salonoj |
| | 16h-17h - **Komunikada Seminarieto** | En Kongresejo |
| | 18h - - **Gazetkonferenco** | En Campanile |
| | 19h - *Vespermanĝo - Tipa Liona Bufedo* | En Campanile - Prezo : 98 FRF (inkl. de vino) |
| | 20h30 - **Interkona Vespero** | En Kongresejo (Bala Salono - Teretaĝa)<br>Kantoj - muziko - vortludoj |
| Vendredon 17/05/96 | 9h - **Estrara kaj Komitata Kunsidoj** | En Kongresejo (malgrandaj salonoj)<br>*Trinkaĵoj ĉe kongreseja baro* |
| | 11h - **Oficiala Malfermo.** - Preiego(-j)<br>- Informoj pri UFE - ktp | En Kongresejo (Granda Amfiteatro )<br>kun invititoj (Eminentuloj, ĵurnalistoj) |
| | 12h - *Honortrinkado* - en Kongresejo | regalita de Urbestraro Villeurbanne |
| | 12h30 - *Tagmanĝo* - Libera en apudaj restoracioj | Kafeterio Le Ferry, 150, Rue du 4-Août ( 8mn de Kongresejo), kaj pluraj malgrandaj restoracioj.<br>Kafeterio Casino ( metro Charpennes) - |
| | 14h-17h - **1a Ĝenerala Kunveno** (Bilanco kaj Perspektivoj) | En Kongresejo (Granda amfiteatro)<br>*Trinkaĵoj ĉe kongreseja baro* |
| | 17h - **Komisionaj Kunvenoj** - Take | En Kongresejo (malgrandaj salonoj) |
| | 19h00 - *Vespermanĝo* - Libera en apudaj restoracioj | Kafeterio Le Ferry - kaj aliaj |
| | 20h30 - **Kultura kaj distra vespero** | En Kongresejo - Ĝinjolaĵo - Esperant. kantistoj -<br>Filmo aù diapoj pri Liono - Teatraĵetoj - Skeĉoj - Ktp |
| Sabaton 18/05/96 | 9h00 - **2a Ĝenerala Kunveno**<br>Paùzo - *Trinkaĵoj* | En Kongresejo (Granda amfiteatro) |
| | - 11h - **Kunsido de la Komitato** (Nova konsisto) | (malgranda salono) |
| | - 11h - **Komisionaj Kunvenoj** - G.O.E. | (malgrandaj salonoj) |
| | 12h30 - *Tagmanĝo* | Libera en apudaj restoracioj |
| | 14h30 - Rendevuo ĉe kongreseja enirejo<br>15h - 17h - **Vizito de Fourvière** - Baziliko kaj Romiaj Teatroj -<br>- *Gvidota de Esperantistoj* | Iro per metroo (StJean) kaj ŝnurfervojo<br>(ficelle = funiculaire) |
| | 15h - 17h - Eventualaj **pliaj Kunvenoj** por Komitato kaj Komisionoj | En Kongresejo (malgrandaj salonoj) |
| | 17h30 -19h30 - **Vizito de Vieux-Lyon** (piede - bonaj ŝuoj !)<br>*gvidota de Esperantistoj* | De Fourvière al St Jean per ŝnurfervojo aù de Kongresejo per metroo. R.V. Katedralo St Jean |